

Korajn Salutojn

**Nia Asocio bezonas aktualigi
niajn registrojn de legantoj.
Bonvolu sendi al ni viajn
retadresojn kaj viajn
telefonnumerojn.**

**Queridos lectores y lectoras,
es de mucha importancia que
ustedes nos envíen su correo electrónico,
teléfonos, y si se han mudado,
su nuevo cambio de dirección y apartado postal.**

**Recuerden que su contribución
garantizará que ustedes sigan
recibiendo, como es habitual,
nuestra revista.**

**También, si usted lo desea
puede colaborar con nosotros
depositando su aporte en el Banco Plaza,
en la cuenta corriente N° 13800213020004778,
a nombre de Asociación Venezolana
de Esperanto, RIF. J-00187020. Luego
notifiquen su colaboración a la
tesorera Elizabeth Garzón, por el
teléfono: 04162110558 o por su
correo electrónico:
elimir64@hotmail.com**

Tridek jarojn poste

Jorge Mosonyi

Jam pasis tridek jaroj ekde 1978, kiam Venezuela Esperanto-Asocio, reaktivigita ses jarojn antaŭe (1972), aliĝis oficiale al UEA, kun malmulte da membroj, loĝantaj precipe en la ĉefurbo Karakas, sed kun ambiciaj projektoj iĝi potenca landa asocio. Ni jam publikigis Venezuelan Stelon (ekde 1973), kaj estis eldonintaj la elstaran romanon Doña Bárbara (1975), majstre tradukitan far nia karmemora Fernando de Diego. Ankaŭ fondiĝis en 1978 elektebla kurso de esperanto kun oficiala valoro en la Centra Universitato de Venezuelo. Kaj estis funkcianta modesta esperanto-grupo kun kelkaj entuziasmaj gestudentoj en la sama universitato. Aperis tiutempe relative multaj artikoloj en ĵurnaloj, kaj ni sukcesis realigi kelkajn radio- kaj eĉ televid-intervjuojn, kiuj iomete popularigis la ideon kaj esencon de esperanto ĉe la publika opinio.

Bedaŭrinde, post tiu energia agado kaj fortostreĉoj de la tiama estraro kaj aktivaj gejunuloj, la movado iom post iom malfortiĝis pro diversaj kialoj, internaj kaj eksteraj. Malgraŭ la nombro da kursanoj kiujn ni havis tiutempe, la aktiva membraro de la Asocio preskaŭ ne kreskis, ĉar la plejmulto de la kursanoj ne atingis sufiĉe altnivelan lingvoscion. Krome, ili nur malofte trovis okazon regule uzadi esperanton por praktikaj ĉiutagaj celoj, ĉar ne ekzistas en nia mondregiono vera nacia kaj internacia esperanto-komunumo. Do, la samideanaro restis pli malpli sama kiel antaŭe, kaj nur kelkaj entuziasmuloj subtenadis kaj daŭrigis la movadan vivon ĝis hodiaŭ.

Dum la sama periodo, la internaciaj perspektivoj ŝanĝiĝis je maniero ne tre favora al esperanto, ĉar post la disfalo de Sovet-Unio kaj la eŭropaj socialismaj reĝimoj, la angla lingvo iĝis pli forta ol iam mondscale, kaj la propagando por la akcepto de esperanto parte

VENEZUELA STELO

Apartado postal 47675, Caracas 1041-A
telefonnumero 58-0212.662.9224

<http://www.esperanto.net.ve>
venesperanto@cantv.net

Redakcia Komisiono: Félix García,
Jorge Mosonyi, Esteban Mosonyi,
Johano Negrete kaj Nancy Aquino

Estraranoj:

Prezidanto: Jorge Mosonyi
Vic-Prezidanto: Johano Negrete
Kasistino: Blanca Elizabeth Garzón

Voĉanoj:

Esteban Mosonyi (Interinstituciaj Rilatoj)
Nancy Aquino (Eldonado)
Ricardo Coutinho (Biblioteko kaj Revuo)
Konsilantoj: Félix García kaj Esteban Mosonyi
Enlandaj Delegitoj:
Alfredo Ovalles (Maracay)
Germán Montero (Maracaibo)
Jesús Cedeño (Maturín y Ciudad Bolívar)
Alfredo Portillo (Mérida)
Eksterlanda Delegito:
Andrés Turrisi (Italio)

Pri la enhavo de niaj artikoloj reponde-
cas iliaj aŭtoroj.

Manke de indiko de la aŭtoro, responde-
cas redakcio.

Niaj artikoloj kaj informoj povas esti parte
aŭ plene republikigitaj por laŭleĝaj uzoj,
kondiĉe ke oni citu la fonton.

Krome, ni ŝatus ricevi leterojn de niaj
legantoj, kun taksoj, opinioj, sugestoj kaj
kritikoj. Tio ebligus al ni la plibonigadon
de la revuo, pri kio ni antaŭdankas la
kunlaborantojn.

perdis sian allogon por eblaj interesuloj,
precipe en universitataj kaj intelektulaj
medioj.

Post la vastigo kaj solidigo de Eŭropa Unio,
etaj naciaj movadoj kiaj la nia atendis la
plifortigon kaj eblan oficialigon de esperanto
kiel helpilon por kontraŭbatali la lingvan
malegalecon ene de tiu grandega multnacia
komunumo. Tio estus gravega atingo de
esperanto kiu faciligus nian agadon, sed
ankoraŭ ne okazis, spite al kelkaj sukcesaj
paŝoj tiudirektaj.

Tamen, oni trovas kelkajn favorajn elemen-
tojn por nia movado en la lastaj jaroj. La
streboj al diverseco kaj la lukto por la rajtoj
de kulturaj malplimultoĵ limigas iugrade la
perfortan altrudon de la angla lingvo al la
tutmonda loĝantaro. Samtempe, tutglobaj
komunikiloj kia interreto favoras la popularigon
de esperanto, faciligante ties lernadon kaj
ĉiutagan uzadon inter miloj kaj miloj da
homoj en multaj landoj. Fine, esperanto ĉiam
estos simbolo de paco kaj demokratia
kunvivado en la mondo.

Malgraŭ ĉiaj malfacilaĵoj, ĝi havas promes-
plenan estontecon kaj sufiĉan viv-kapablon
por sukcese enradikiĝi kaj helpi la disvolv-
on de tutgloba interkomunikado kaj interkompreno.

Tiu ĉi revuo estas registrita kiel
Nacia Publikigaĵo:ISSN 1316-0451

Esta revista está registrada como
Publicación Nacional bajo
el número: 1316-0451

LA INSULO DE NEMO (Daŭrigo)

Johano Negrete

Munja finis sian naĝadon kiam revenis al la marbordo kaj eksidis apud Nemo. Li atente kovris ŝin per bantuko cirkaŭante ŝian sinon, dezirante reteni tiun belulinon kvazaŭ ŝi estus en danĝero de malapero. Dum la frua mateno la plaĝo estis preskaŭ senhoma, sed je la malfrua posttagmezo pluraj geparoj promenadis manenmane por vidi la tagfalon. Jam la suno malaltiĝis kaj la marondoj tien kaj reen sonis kiel agrabla melodio. Ĉio aspektis ege bone kaj baldaŭ venus la vespermanĝa horo. Munja alrigardis Nemon kun rideto kaj santempe per la mano kokete aranĝis sian hararon kaj demandis:

—Ĉu vi memoras la unuan fojon, kiam vi vidis mian vizaĝon sur tiuj fotoj, kiujn mi sendis al vi? Kiel vi reagis tiam, karulo? Eble vi seniluziiĝis aŭ ŝokiĝis momente. Ĉu ne? Ĉar vi multe imagis, ke mi estus tute malsama; vere, ne malpli ol granda belulino.

—Kia demando estas tia nun? Sed... certe mi ne eraris! Mi trovis ĉe la foto mirindan belulinon, kia vi estas.

—Flatado, flatado! Vi kondutas same kiel en la unuaj leteroj. Ho, vi viroj estas samaj ĉiulande.

—Kaj vi virinoj, ho, antaŭ la majesta beleco, kiu tiom multe impresas nin virojn, ĉiam reagis same, tio estas, kun troa skeptikismo. Sed, kial?

—Kial ne? Ĉu ni devus konfidi, ke iu ajna viro, tutbelsone kvazaŭ trovatoro, trumpetu al ni je la oreloj kun preciza celo konkeri aŭ moligi nin?

—Mi kredas, ke viroj ne kondutas same kiel virinoj ĉi-punkte— Nun Nemo sentis, ke li devas klarigi la vojon por ludi iom pli per facilaj galantvortoj kaj tiam daŭrigis ĉi tiel:

—Viroj akceptas galantvortojn pli nature.

Eble kelkaj el ili vantas pli ol aliaj, sed al ĉiuj viroj funde plaĉas tiaj vortoj, eĉ se ili malmulte kongruas kun la vero. Pro tio, mia kara karulino, ankaŭ se iomete, vi devas fidi je miaj bonintencaj galantvortoj, kvankam mi ĉiam sinceras pri via belo, kaj fieras pri esti via unua fidele adoranto.

Ŝi sciis pri la inklino de Nemo ludi cinike per vortludoj, kion li povis facile fari, dum trankvile simulis seriozan aspekton kune kun tia libera dispono esti adoranto. Pro tio, ŝi ne nur ne tute kredis lin, sed kontraŭatakis:

—Kara, vi estas hispano. Ĉu vi hazarde konis iun faman ulon nomitan Don Nemo Tenorjo, kiu kreskis en via lando, kaj instruis al multaj viroj de la mondo kiel frenezigi virinojn? Ĉu jes?

—Tenorjo? Momenton, Lasu min pensi. Mi kredas, ke mi aŭdis iom pri li, sed nun ne memoras bone. He! eble ĉe mezlernejo! Tenorjo!? Tenorjo!? Muzikisto? Ja eble. Kial, kara? kial? — demandis lin kun naiva aspekto.

—Ha, cinikulo! Vi ĉiam igis min suspektema pri via naiveco.

Nun ŝi ekstaris kiel malhumila kolumbo, frotadis sian malsekan hararon, kaj alkroĉis la bantukon al sia kolo. Ŝi estis alta, verdire ne malpli ol 1,72 metroj, kaj ŝajnis ankoraŭ pli alta en tiu alloga blanka banvestaĵo, kiu bone tajlis sian figuron. Ekde tia alteco ŝi invitis lin ekstarti kaj sekvi ŝin senkondiĉe tra la sablo, sed kun la vido al la ĉielo, parolis al li ne sen sorbeto da pikanta hom-komparo:

—Kara, vidu tiujn mevojn sur la boato! Kiel bele ili ŝvebas sur la aero, preskaŭ senmove. Tiuj birdoj ŝajnas dormi pace, senkulpe, sendanĝerige, sed subite, zassssss! per rapida movo ili sin ĵetas surmaren kiel sago al celo

4/ VENEZUELA STELO

kaj kaptas fiŝon. Kaj dirinte tion, Munja prenis la manon de sia karulo, rigardis lin kun eta mokemo en siaj helbluaj okuloj kaj alproksimiĝanta, kisis lin dolĉe kaj kontentige surlipe kaj survange dum la suno komencis pligrandigi ĝian ruĝon kaj subeniris pli rapide ĉe la horizonto. Nun la maro plaŭdas trankvile kaj la plaĝo preskaŭ solas pro la atendita vizito de la ombroj; fakte, apenaŭ ili kaj aliaj fascinitaj geparoj plezuras antaŭ tiu vidindaĵo.

—Venu, karulo, ni revenu al nia gastejo. Jam tempos por iri manĝi.

—Jes, mia bela blondulino. Ĉi-nokte ni dormos en brakumo. Vi varmegos min kiel suno de noktomezo, nun kiam la alia malaperas. En via orelo mi rakontos pri la ĉeno de mia vivo, tio estas, pri la unua ĉenero.

—Kiu ĉenero?

— La unua.

—Mi ne komprenas, kara— diris Munja iomete perpleksigita.

—La unua amiluzio, tiu kiu bezonas multe da tempo kaj peno por sin realigi tra la vivo, sed bonŝance ĝi estas realigebla. Ne gravas ke la persono variu mense kaj la aĝo pliiĝu. Nun promesu al mi aŭskulti serioze mian sekvantan rakonteton. Hej! mi diris serioze kaj senmoke kaj sencinike. Ĉu komprenite? Mi petas, kara karulino, kaj se tiel mi pli amos vin. Mi ĵuras.

—Komprenite, sinjoro kaj granda mastro de mia volo. Mi obeos— kaj Munja ornamis tion per gracia palaca riverenco.

La suno adiaŭis la tagon. Jam survoje ambaŭ atingis la padon por sin direkti al la proksima gastejo, kie ili feris plurajn tagojn en tiu paradiza insulo, pri kiu oni jam rakontis.

(Daŭrigota)



HISTORIO DE ETA TINEO

Esperantigis: Ricardo Coutinho

Iu tineeto loĝis kun sia patrino en iu ŝranko. Ĉiufoje kiam iu persono malfermis la ŝrankon, la patrino de la tineeto ektimiĝis kaj kaŝis sin ene de la mallumo de la ŝranko kun sia filo. Sed la tineeto volis scii kio estas ekstere.



-Neniam faru tion. Ekstere estas personoj, kaj ili ne ŝatas nin. Se ili vidus vin, ili mortigus vin.

Sed la tineeto ne kredis tion, kaj iun tagon li forflugis por ekkoni la mondon. Preskaŭ je la nokto li revenis al la ŝranko, kie la patrino atendadis maltrankvila.

-Ho, mia patrino, la personoj ne malamas nin. Tute kontraŭe. Se vi povus vidi... kiel ili aplaŭdis kiam ili vidis min fluganta.

Fonto: Caracol 3 (libro de lectura tercer grado). Miranda (Venezuelo), Santillana, 1987, p. 22

ETA HISTORIO DE SAMSEKSAMO EN KVIN FAZOJ

Unua fazo: Ĝi estis peko, kiun oni devas puni.

Dua fazo: Ĝi estis malsano, kiun oni devas sanigi.

Tria fazo: Ĝi estis anomalio, kiun oni devas toleri.

Kvara fazo: Ĝi estas diferenco, kiun oni devas respekti. (Ni nun troviĝas en tiu ĉi fazo)

Kvina fazo: Ĝi estos virto, kiun oni devas premii.

Rimarko: Mi ne konsentas, nur konstatas.



Jorge Mosonyi

KONSIDERINDAJ FRAZOJ DE LES LUTHIERS

Esperantigitaj de: Andrés Turrisi

- 1.- Ĉiu tempo pasinta... estis antaŭa.
- 2.- Havi puran konsciencon estas simptomo de malbona memoro.
- 3.- Fiŝo batalanta kontraŭ la kurento, mortas elektrokutita.
- 4.- La honestuloj estas sociaj neadaptitoj.
- 5.- Tiu kiu naskiĝas malriĉa kaj malbela havas grandajn eblecojn por ke, kiam li kreskos, al li pliiĝu ambaŭ kondiĉoj.
- 6.- Se la monto venas al vi...forkuru! Okazas ter-glito.
- 7.- Gravas ne venki, sed malvenkigi la kontraŭulon.
- 8.- Mi ne estas kompleta sentaŭgulo...Mi almenaŭ taŭgas kiel malbona ekzemplo.
- 9.- Se oni ne estas parto de la solvo...oni estas parto de la problemo.
- 10.- Iu virino puŝis min al la drinkado...kaj mi neniam montris la afablecon danki ŝin.
- 11.- Erari estas homa... sed ĵeti la kulpon sur aliulojn estas eĉ pli homa.
- 12.- Gravas ne scii, sed koni la telefonnumeron de iu kiu scias.
- 13.- Mi ne suferas je frenezo...mi ĝin ĝuas ĉiumomente.
- 14.- Estas bona afero formeti la trinkaĵon, malbona estas ne rememori kie.
- 15.- Inteligento postkuras min, sed mi estas pli rapida.
- 16.- Vero absoluta ne ekzistas... kaj tio estas absolute vera.
- 17.- Ekzistas mondo pli bona, sed ĝi estas ege multekosta.
- 18.- La virino kiu ne havas bonŝancon koncerne la virojn...ne scias kian bonŝancon ŝi havas.
- 19.- Pigremo estas patrino de ĉiuj malvirtoj kaj kiel patrinon oni devas ŝin respekti.
- 20.- Se birdeto diras ion al vi...vi certe estas freneza, ĉar la birdoj ne parolas.
- 21.- Ne prenu la vivon serioze, finfine vi ne eliros viva el ĝi.
- 22.- Feliĉaj tiuj kiuj nenion atendas, ĉar neniam ili estos frustrataj.
- 23.- Ne estas trista iri al la tombejo, sed resti en ĝi.
- 24.- Ekzistas du vortoj kiuj malfermos al vi multajn pordojn: "Tiri" kaj "Puŝi".
- 25.- Kial trinki kaj stiri, se vi povas fumi kaj flugi?
- 26.- El ĉiu deko da personoj kiuj rigardas la televidon, kvin estas la duono.

7/ VENEZUELA STELO

Naciaj Novaĵoj:

Enketo:

En Aprilo nia samideano Alfredo Portillo sendis al mi etan liston pri venezuelaj esperantistoj. Mi pligrandigis ĝin iomete kaj sendis la liston al aliaj samideanoj. La celo estas fari enketon pri esperantistoj kiuj izolite aŭ grupe esperantumas, por povi repreni la interrilatojn jam delonge forlasitajn, precipe koncerne la enlandajn geesperantistojn. Do, ni petas la aliĝon de la ceteraj esperantistoj kiuj loĝas en tiu ĉi bela lando, kaj invitas ilin unuiĝi kun ni. Redakcia Retadreso:

venesperanto@cantv.net

Invito:

Per naskiĝotagogradulo kiun mi ricevis de Irina el Britio, kursanino de www.lernut.net, mi ekkonis la kursanoserĉilon de tiu paĝo. En ĝi mi trovis multajn venezuelajn gekursanojn kaj mi invitis ilin partopreni en la nacian esperantistaron kaj ricevi helpon de ni.

Universala kaj Aŭgusta Frateco

La esperantisto kaj membro de tiu ĉi grupo, Francisco García alvenis la pasintan jaron por la Kongreso Universala de tiu Frateco. Lia parolado pri Esperanto entuziasmigis multajn el ili, kaj ili tuj faris retkurson, poste ili petis al Johano Negrete individuan intruan helpon. Ilia intenco estas disvastigi siajn doktrinojn al la tuta mondo pere de Esperanto kaj ili intencas instrui esperanton pere de registara apogo de la prezidanto Hugo Chavez. Ankoraŭ tiu ĉi ideo ne sukcesis. Venezuela Esperanto-Asocio faris kelkajn demandojn al Francisko kaj al la hungara redaktoro de la ĵurnalo Hungara Nacio pri la projektoj, sed ili rifuzis nian apogon ĉar la projektoj estas ekskluzivaj de ilia frateco. Venezuela Esperanto-Asocio deziras sukceson al tiu ĉi organizaĵo.

Internaciaj Novaĵoj:

Esperanto en Televido

La 2-an de majo 2008 ĉe la retejo startis novan projekton: "TV - esperanto" aŭ "Televido-Esperanto". Ĝia celo estas "...transdoni gravajn informojn por esperantistoj ne nur el Bjalistoko, la naskiĝurbo de la iniciatinto de la internacia lingvo, sed ankaŭ el aliaj partoj de la mondo, kie delonge la ideo de Esperanto estas konata...". Ĝi elsendos programojn pri esperantistoj, iliaj sukcesoj, kluba agado, kongresoj, renkontoj, Esperanto-teatroj, muzikaj ensembloj, filmoj kaj vizitindaj lokoj. Oni povas kontakti kun la redakcio pere de Bjalistoka Esperanto-Societo, PL-15-282 Bialystok, ul. Piękna 3, skr. pocz. 67, Pollando. Fonto: <http://www.eventoj.hu>

Parolu la Mondo

Nova radioelsendo de brazila geesperantistaro kaj aŭspiciata de Radio Boa Nova de San-Paŭlo. Ĝi havas freŝajn programarojn kaj oni povas facile aŭskulti ĝin pere de: www.parolumondo.com

[Kion donis al mi esperanto?](#)

La urbo Lodz en Pollando ĉi jare festas 100-an datrevenon de E-movado. Okaze de tiu solenaĵo en aŭgusto oni organizas 31-an Tutpollandan Esperanto-Kongreson. Oni petis al ĉefredaktoroj de lokaj amaskomunikiloj (gazetoj, ĵurnaloj, radio) skribi pri Esperanto kaj pri la solenaĵo. Tiun peton interalie akceptis dumonata kultura revuo "Kalejdoskop Kulturalny" (Kultura Kalejdoskopo) kaj la ĉefredaktoro atendas respondojn al la demando "Kion donis al mi Esperanto?".

Estus bone se respondoj venos de diversaj landoj de la mondo. Sufiĉas malgranda teksto, maksimume 1/3 de paĝo. Bonvolu indiki: nomon, landon kaj profesion. Se vi povus en du tri tagoj respondi al la adreso de Robert Kaminski, la geesperantistoj de la urbo ege dankos vin. Robert Kaminski.

LA SOIFIGA ARBO

Ŭahira rakonto

Esperantigis: Jorge C. Mosonyi

En la seka tero de la Ŭahira duoninsulo vivis onidire viro tre lerta kaj laborema, kiu ŝatis fojfoje ĉasadi.

Tiu viro havis plantejon ne tre grandan, kie dum la pluvaj sezonoj li semadis kun sia edzino maizon, kukurbon, fazeolon, kukumon, mileon, dolĉan kaj maldolĉan mandiokon, krom aliajn plantojn kiujn la ŭahiroj konas kaj kultivas.

Kiam la viro iris ĉasadi al la arbaro li kunportis arkon kaj sagojn por ĉiuspecaj bestoj. Luj taŭgis por ĉasi kuniklojn, aliaj por cervoj, igvanoj kaj tiel plu.

Estante bona ĉasisto, li ĉiam alportis ion revene, almenaŭ lacertojn aŭ sovaĝajn kolumbojn, kiujn senprokraste li preparadis kaj manĝadis kune kun sia familio.

Iutage dum la ĉasado la viro sentis soifon. Jam sur lia zono pendis pluraj igvanoj kaj kunikloj, kaj kelkaj lacertoj en la pintoj de liaj sagoj, kiam suferante pro soifo li ĉesis ĉasi.

La soifo estis terura. Tio maltrankviligis lin, kaj li ekmarŝis serĉante akvon por ĝin forigi, sed tiel malbonŝance, ke li ne povis trovi akvon kiom ajn li marŝis. Sensukcese kaj senripoze li marŝadis, ĝis kiam, malorientiĝinta, li komencis vidi ĉion renversita, kaj li perdiĝis en la arbaro.

Antaŭ ĉi tiu cirkonstanco la viro pensis ke li tutcerte mortos, sola en tiu arbaro.

-Ve al mi, kiu havas tiun ĉi destinton! Kia domaĝo, ke miaj familianoj ne vidos mian vizaĝon kiam mi mortos, kaj ke mia karno iĝos manĝaĵo de la malbelaj vulturoj!- li diris al si kun profunda malgajo.

Tamen la viro ne konsideris sin venkita antaŭ la morto, kaj nur imaginante sin en tiu terura situacio li kroĉiĝis al la vivo, dirante al si:

-Ho, se mi havus supernaturan povon por transformiĝi en ion alian kaj ne morti!

Post tio la viro sentis ke io okazas al li.

Subite li transformiĝis en arbon. En fortikan kaj foliplenan arbon! La predoj kiujn li kunportis ankaŭ transformiĝis. La igvanoj, la kunikloj, ĉiuj transformiĝis en grandajn fruktobukedojn.

Nun la viro estas mamon-arbo, kun siaj karnoplenaj kaj bongustaj fruktoj pendantaj en grapoloj.

Tiel oni rakontas. Pro tio oni diras en la Ŭahiro ke la mamon-arbo havas misteran povon kaj ke, se vi en via infanaĝo manĝas tre abunde ĝiajn fruktojn, certe post via kresko ĝi ofte suferigos vin pro soifo, same kiel okazis al tiu viro kiam li ĉasadis en la arbaro.

Sekvo de la 8a paĝo

Noto: La *soifiga arbo* estas tradicia rakonto de la ŭahira indiana popolo, la plej multnombra indiana etno de Venezuelo, kies nombro atingas ĝis almenaŭ 300.000 homoj. Ili vivas en la Ŭahira duoninsulo, seka teritorio ĉe la Kariba maro, dividita inter Kolombio kaj Venezuelo. Ili ankaŭ troviĝas en proksimaj urboj, kiaj Marakajbo (Venezuelo), Riohacha kaj Maicao (Kolombio). *La soifiga arbo* estis originale rakontita de Miguel Angel Jusayú (“Husajuu”), fama indiana verkisto kaj specialisto pri ŭahira gramatiko kaj leksikografio. Ni prenis la tekston el dulingva eldonaĵo (ŭahira-hispana) kies titolo estas *Kane'wa, el árbol que daba sed* (Ed. Monte Avila, colección Warairarepano. Caracas, 2005).

SEP SOCIAJ PEKOJ

(El: Mahatma Gandhi, *Young India*,
1925)

Politiko sen principoj

Riĉeco sen laboro

Plezuro sen konscienco

Sciado sen karaktero

Komerco sen moralo

Scienco sen humaneco

Kulto sen ofero

LA PREĜO DE MAHATMA GANDHI

Esperantigis: Jorge Mosonyi

Dio Mia!

Helpu al mi diri la veron antaŭ la potenculoj.

Kaj ne diri mensogojn por gajni aplaŭdon de la malfortuloj.

Se vi donas al mi riĉaĵon, ne forprenu de mi la racion.

Se vi donas al mi sukceson, ne forprenu de mi la humilon.

Se vi donas al mi humilon, ne forprenu de mi la dignon.

Helpu min ĉiam vidi la alian flankon de la medalo.

Ne lasu min kulpigi aliajn pri perfido pro la fakto ne pensi same kiel mi.

Instruu min ami la homojn same kiel min mem.

Ne lasu min fali en orgojlon se mi venkas. Nek en malesperon se mi fiaskas.

Memorigu al mi ke fiasko estas la sperto kiu kondukas al triumfo.

Instruu al mi ke pardono estas signo de grandeco, kaj ke venĝo estas signo de fiĉco.

Se vi forprenas de mi la sukceson, lasu al mi fortojn por lerni el la fiasko.

Se mi ofendus la homojn, donu al mi kuraĝon por min senkulpigi.

Kaj, se la homoj min ofendas, donu al mi kuraĝon por pardoni.

Sinjoro... se mi forgesas Vin, neniam Vi forgesu min!

LINGVA NEŬTRALECO DE ESPERANTO

Félix García Blázquez

Komplementante la temon de “Neŭtraleco kaj politiko en Esperantujo” estas interesa analizi la problemon el la lingva vidpunkto.

Efektive, en la esperantistaro oni notas la influon de la denaska lingvo ĉe kelkaj uzantoj, kaj ekzistas la tendenco proponi enkondukon en Eo ĉu de radikoj ekstraktitaj de la denaska lingvo de la proponanto, kiel ankaŭ kaj kio estas pli grava de gramatikaj reguloj ĉu sintaksaj aŭ vortformaj.

Unu ekzemplo estas de iu hispana samideano kiu iam proponis la sufikson “-azo” por indiki “frapo”n per aĵo esprimita en la radiko de la derivaĵo. Tiu propono estas evidente malmulte internacia kaj estas ekzemplo de partianeco t.e. manko de neŭtraleco. Tiurilate mi proponis kaj uzas la finaĵon “-apo”. Pri tio, oni kritikis min argumentante ke ne ekzistas en Eo tiu sufikso sed mi defendis mian tezon, ĉar ne temas pri nova sufikso, sed pri sinkopo. Se mi diras “piedapo” tio simple estas sinkopo de “piedfrapo” kaj ĝi ne estas malpermesinda, ĉar sinkopoj, laŭ mia scio, ne statas malpermesitaj far la Akademio; do estas tute lica uzi ĝin. Plie “-apo” estas pli facile komprenebla flanke de azianoj kaj afrikanoj.

La uzo de la numeralo “unu” kiel anstataŭo de nedifinita artikolo estas neneŭtrala, spite ke ĝi troviĝas en la Ekzercaro. Laŭ informo de PIV hodiaŭ oni preferas la uzon de la tabelvorto “iu” aŭ uzi nenion. Tiu moderna uzmaniero neniel signifas ke uzi la numeralon “unu” en la funkcio de nedifinita artikolo estas nekorekta, sed apenaŭ ke ĝi estas arkaismo.

Kutime aperas en E-tekstoj la lokucia konjunkcio “pro tio ke” kiu ŝajnas galicismo, ĉar en franca lingvo ekzistas la formo “parce que”. Tamen por alia uzo de la pronomo “tio” antaŭ la konjunkcio “ke”, oni povas legi kelkfoje la formon “malgraŭ tio ke “ kio ne estas influo de la franca, ĉar en tiu lingvo la ekvivalento estas “malgré que” sen la partikulo “ce”; konklude, tre eble ekzistas aliaj lingvoj en kiuj prezentiĝas tiuj formoj. La fakto estas ke la logika sinteno estas ke se oni aplikas la principon de suffiĉo kaj neceso tiuj formoj estas superflujaj, kaj plie la principo de simpleco estas alia apogo por preferi la formojn sen la intermeto de la pronomo “tio”.

Alia pseŭdoregulo kiujn kelkaj uzantoj konsideras ĝusta estas la jena: post prepozicio oni ne rajtas meti infinitivon. Tiurilate, kiam mi studis anglan lingvon, la profesoro instruis ke post prepozicio anstataŭ meti infinitivon, devas iri prezenca participo t.e. vorto kun la finaĵo “-ing”. La escepto estas kun la prepozicio “to”. Estus interesa ke kelka poligloto informu nin ĉu la citita kvazaŭregulo estas influo de alia lingvo ol la angla. Plie PIV plene akceptas ke post la prepozicio “sen” oni uzu verban infinitivon.

felixgarciablazquez@hotmail.com

LA PADON FARAS IRADO de Antonio Machado

Johano Negrete

Tiu poemo "La padon faras irado", ofte recitata kaj eĉ kantata, famas, ĉar ĝi enhavas ripenson pri la vivesenco kaj originaleco de ĉiu homo antaŭ sia propra vojo. Tiu ĉi filozofa poemo, kiun oni povas parkere reciti kiel vivoleĝo, estas ricevita de *Movado sen Nomo* en 2007 al kiu mi aldonos mian komenton.

Antonio Machado estas unu el la grandaj hispanaj poetoj, fidela reprezentanto de la literatura generacio de 1928. Li naskiĝis en Sevilla (Seviljo) en 1875 kaj mortis tragike kortuŝita de la hispana Civila Milito en vilaĝo de Francio en 1939. Mi legis nur unu esperantan eldonon de poemlibro de Machado titolita **La Lando de Alvargonzalez**, verse esperantigita de Fernando de Diego, kaj ĝi sin montras bela ero de la hispana romancaro.

Antaŭ la prezento de konata esperanta poemo, oni povas aldoni iom de la stilo de Machado en la hispana lingvo referita al la sama poemo. Jen tiu ĉi universala estrofo :

«Caminante, son tus huellas// el camino, y nada más ;//caminante, no hay camino :// se hace camino al andar.// Al andar se hace camino, // y al volver la vista atrás // se ve la senda que nunca // se ha de volver a pisar.// Caminante, no hay camino, // sino estelas en la mar. »

Sendube ĝi estas tre filozofa poemo, kie la irado egalas al ĉies propra vivo, kiu montras sin senrela vojo aŭ sen antaŭvojo, ĉar nia propra irado ne havas determinon. Do estas neniu, kiu disdonas al ni sorton. Oni ne povus

trovi la bonan aŭ malbonan marŝon de sia vivo per la religio, ĉar la dioj ne kontrolas la hom-iradon. Homo estas tute libera kaj tute responsa pri sia propra vivo. La dioj scias nenion pri tiu irado, ĉar aŭ ili ne ekzistas aŭ estas senpovaj por interveni sur la hom-iradon. Eĉ ankoraŭ aliaj klasikaj "ekzistaĵoj" kiel Fato, Fatalo, Fortuno aŭ Providenco kontraŭdire estas tute senpovaj por variigi la hom-konstruon de ties pad-iradon.



Kaj jen la poemo esperantigita sur karto de
Movado sen Nomo.

LA PADON FARAS IRADO

Promenanto, estas viaj paŝoj,
kiuj faras la padon, kaj nenio pli;
promenanto, ne estas pado,
la padon faras irado.
Promenante, vi faras padon,
kaj retrorigardante,
vi vidas la padon, kiun vi
neniam devos iri denove ;
promenanto, ne estas pado,
sed nur spuroj en la sablo.

La vivon oni devas mem vivi, propraforte kaj
propra-iniciate. Ne ĉiam facilas, sed finfine, en
la propra vivo, la protagonisto ja estas vi mem!
Se vi ne plu scias kion fari, eksidu kaj pripensu.

Sed foje ne eblas sole trovi la vojon. Tio
estas tute normala afero. Por tio, ni havas
familion kaj geamikojn. Ili povas helpi nin; ja
neniu diris, ke oni devas vivi la vivon sola. La
veraj geamikoj estas la bonaj vojindikiloj,
kiuj helpas nin orientiĝi. Sed la promenadon
mem, tion nidevas fari per la propraj
piedoj.

Do, kuraĝon, karaj geamikoj, sur via vojo. Kaj
ne forgesu : *la unua paŝo estas la plej malfacila.*

ANTONIO MACHADO
Levilkarto No. 3 (Julio-aŭgusto-septembro
2007),

Granda Rabato

Gramática de Esperanto
(Nivel Medio)

Gramática de Esperanto
(Nivel Avanzado)

**Skizo por Racia Terio
de Vortfarado.**

Ĉiuj verkaĵoj de Félix
García Blázquez. Unu libro
kostas 10 bolivarojn plus
sendokosto.

Tiu ĉi revuo estas registrita kiel
Nacia Publikigaĵo: ISSN 1316-0451

Esta revista está registrada como
Publicación Nacional bajo
el número: 1316-0451